

La Espero

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

EL LA ENHAVO

Kanadaĵ radioj 72

Magda Bohman
in memoriam 74

Kulturo de la rumanoj 76

Kalocsay 80-jara 80

La bildo montras "Kaĉjo"-n
laŭ fotoĵo de John Alexander.
Vidu paĝon 71.


Abono 15 sv. kr.

Postĝiro: SEF 20 12

6

1971

59-a jaro



La 15-a de decembro estas la tago de la Esperantolibro.

Granda parto de tiu ĉi numero estas dediĉita al du gigantoj de nia literaturo: Magda Bohman-Carlsson, kiu ne plu troviĝas inter ni, kaj Kolomano Kalocsay, kiu fariĝis 80-jara antaŭ kelkaj semajnoj. Ambaŭ donacis al ni majstrajojn, kiuj levas nian literaturon al nivelo komparebla al tiuj de la naciaj lingvoj, kaj iliaj nomoj kaj verkoj restos vivantaj tiom longe kiom vivos Esperanto mem.


Por nacia lingvo ĝia literaturo estas grava afero; per ĝi la primitiva dialekto fariĝis kulturlingvo kaj el ĝi la koncerna popolo ĉerpas memfidon.

Por la internacia lingvo vivanta literaturo estas nepre vivkondiĉo. Ĝi estas la firma bazo mem de la lingvo, la fundamento, sur kiu lingvo evoluas kaj adaptiĝas al la ĉiam ŝanĝiĝantaj cirkonstancoj de la socio. Per sia literaturo vivas la lingvo, sen literaturo ĝi mortas.

Ĉu ni ĉiam konscias pri tio? Ĉu ni komprenas, kiel gravega estas la malfacila laboro de niaj verkistoj, tradukistoj kaj — eĉ pli — eldonejoj. La laste nomitaj batalas en tiuj ĉi tagoj kun ĉiam plialtiĝantaj kostoj, kaj bedaŭrinde ne kreskas samgrade la intereso de nia esperantista popolo por aĉeti kaj legi.

Ni svedaj esperantistoj loĝas dise en nia longa lando, kaj nur en relative malmultaj lokoj ni povas kolektiĝi kaj formi klubojn por efika agado por Esperanto. Kaj eĉ ni, kiuj vivas en lokoj, kie kluboj ekzistas, ne ĉiam havas eblecon labori por Esperanto tiel energie kaj aktive kiel ni dezirus. Sed almenaŭ en unu kampo ni povas ion fari, ĉiu el ni: niajn eldonaĵojn ni povas aĉeti kaj legi. El tio profitas ne nur ni mem — la legado eble estas nia sola kontakto kun la lingvo — sed la apogo, kiun ni tiamaniere povas doni al nia movado kaj nia lingvo vere ne estas sensignifa.

Eldona Societo Esperanto en Malmö povas liveri kiun ajn Esperantolibron lastatempe eldonitan kaj ankaŭ pli malnovajn. Sendu vian mendon au petu pri informoj jam hodiaŭ.



NOV.-DEC. 1971

Numero 6. 59-a jaro

Spertoj kaj konsideroj dum la Elsinora kurso 25.7—1.8 1971

Por plibonigi mian kapablon paroli Esperanton, mi vizitis internacian ferian kurson, kiun aranĝas ĉiujare sinjoro L. Friis. La kurso efektive konsistas el tri kursoj.

1. Elementa kurso — kiu ankaŭ estas Prepara kurso por Friis-metodaj geinstruistoj. (Do ankaŭ por ne-komencantoj.)
2. Konversacia kurso, kiu donas riĉan eblecon interparoli — kompreneble en Esperanto.
3. Perfektiga studrondo, kiu substrekas la korektajn stilon kaj formon de Esperanto. Oni laboras parte en grupoj — tri- aŭ kvarope. Plej ofte unu el la grupo prezentas la grupan rezulton antaŭ la instruisto kaj la tuta partoprenantaro.

Ĉi tiu kurso estas altnivela kaj tial postulas, ke la partoprenanto jam antaŭ la kurso estas sufiĉe bone preparita, gramatike ekz. — Do ĝi ne estas por komencantoj!! — Oni ne "rajtas" aparteni al grupo, kiu enhavas samlandan(in)on. Nur Esperanto estas tolerata, kiel komunikilo.

Antaŭtagmeze okazas la instruado. Posttagmeze oni aranĝas ekskursojn. Vespere oni prelegas, prezentas lumbildojn, filmojn k. t. p. Oni kantadas, diskutas kaj interbabilas.

Ĉirkaŭ la manĝotabloj oni ankaŭ multe interparoladas, kaj oni "devas manĝi multe", laŭ la kursestro. Kiel lingvon li nur toleras Esperanton. La partoprenantoj ne rajtas "krokodili", se ne temas pri vera komencanto.

Dum ĉi tiu kurso pli ol 100 personoj, el 15 landoj, — kursanoj kaj kelkaj invititaj gastoj — havis la eblecon ĝui la ĉeestadon dum la jubilea vespero. Tiam oni nome festis la 40-jaran jubileon de la kursaranĝoj. Kaj memorinda la festo vere estas.

Favore al s-ro Friis oni multon diris. Oni laŭdis lin pro lia sinfordona laborado por kaj per Esperanto. Li ricevis multajn florbukedojn kaj aliajn donacojn, ekz. starlampon.

La finfesto enhavis riĉan kaj varian programon. La feston lerte gvidis P. Jørgensen kaj s-ino Tove Bak. Ili ambaŭ multe helpis al s-ro Friis dum la tuta semajno.

Fakte multege da Esperanto estis paroladata dum ĉi tiu kurso, kiun mi rekomendas tutkore. Oni tutsimple estas devigata uzi nur Esperanton, kaj tial oni vole nevole lernas kaj plibonigas sian parolkapablon.

Dum la kurso mi denove rimarkis, ke la homoj plej ofte parolas tro rapide kaj mallaŭte, kaj oni ankaŭ malzorgas pri la elparolo. Kaj kial ne malfermi la buŝon sufiĉe?? Pro tio la komencantoj diras:

— Mi ne komprenas. Mi ne aŭdas, kion diras la parolanto. La spertuloj ne havas tempon por mi kaj ne volas paroli kun mi.

Komencantoj ne kapablas diveni, kion la alia persono volas esprimi. Ni laboras multe por gajni novajn membrojn, sed poste ni tro ofte forgesas, ke la komencantoj dum longa tempo bezonas nian apogon kaj kuraĝigan stimulon.

Per malklara kaj mallaŭta — do: ne sufiĉe aŭdebla — parolado ni donas al la komencanto malmultan helpon. Tiamaniere ni fakte multfoje malkuraĝigas kaj timigas la komencantojn. Pli ol unu komencanto diris tion al mi!

Mi asertas, ke estas gravega afero, ke ni ĈIAM

1. parolu kun klara prononcado, bona makzelarĉikado kaj ventra apogo, (Ni devas movi kaj la lipojn kaj la malsupran makzelon. — Do ni malfermu la buŝon! — Kaj se la voĉo estas tro malforta, ni certe bezonas paroli kun apogo de la ventro.)
2. parolu sufiĉe laŭte kaj malrapide, (Se ni parolas malrapide ni ankaŭ havas eblecon kontroli la gramatikon kaj tiamaniere doni al la aŭskultantoj gramatikan helpon.)
3. elparolu ĉiun sonon ĝuste!

Kompreneble la plej grava situacio estas, kiam ni parolas kiel instruanto, kiel preleganto, aŭ antaŭ alia publiko. Sed gravas ankaŭ, kiam ni interparolas kun komencantoj, duope aŭ triope.

Bone estas, se ni pensas kiel instruanto, ankaŭ kiam ni ne havas tian taskon. — Ni deziras, ke la aŭskultantoj kaj aŭdu kaj komprenu nin, ĉu ne??

Ni aŭskultu ekz. s-ron Ib Schleicher. Li parolas bonege. Aŭdante lin mi ĝuas. Ankaŭ komencantoj komprenas lin. Ni parolu sammaniere!

Parolante pri komencantoj ni ankaŭ GAZETE tro multe flankenlasas ilin. Ankaŭ por komencantoj ni devas havi paĝon.

Ni ne forgesu instigi kaj stimuli la komencantojn!!

Sören Sandqvist

EKSKURSO AL LA KONKURSO

Miriam Lion

"Kaj nun, Kaĉjo, la respondeco estas via", mi diris, diskombante lian abundan kolhararon super lian numero-etikedon.

Kaĉjo ridgrimacis.

"Kion vi volas diri, la respondeco estas mia?" li ronronis. "Mi bonege fierigis vin ĉe konkursoj. Vi ĉiam insistas, ke mi ne estas perfekta kato."

Mi timegas, ke Kaĉjo iam sciigos, ke li estas ĝuste tia.

"La perfekta kato estas ankoraŭ naskota. Vi estas sufiĉe bona, sed via nazo estas tro longa, kvankam vi havas en vi bonajn heredliniojn."

"Ankaŭ vi havas, kaj via nazo estas tro longa, sed neniu postulas ke vi partoprenu konkursojn pri beleco."

"Malĝentile! Mi faris mian devon: brosis kaj kombis vin dufoje tage, alkitimigis vin al kaĝo, ĉirkaŭbrakis vin, vitaminumis vin..."

"Ne denove! Kion vi atendas de mi ĉi-foje?"

"Unue kaj ĉefe, ne sidu en via necesejeto — aspektas maldelikate. Ne dormadu dum la tuta tago kaj ne montru vian dorsan panoramon al la juĝistoj. Ne sidu tie, aspektante enua kiel leono en kaĝo."

"Ne plaĉis al vi, kiam mi maĉis miajn premiokuponojn kaj tiris la tegmenton de mia kaĝo enen. Mi odoras bone, mi tenas pura mian voston, mi kondutas kiel ĝentlemano (kiu mi ne estas, dank' al vi), do, kion plu mi povas fari por vi?"

"Karega, mankas, al vi efekto. Filmsteloj, aktoroj, operkantistoj, pentristoj havas ĝin, ankaŭ la eminentaj hundoj kaj katoj. Estas ia plusa ama aĵo."

"Sonas al mi, kiel ia reklamo por dentosapo aŭ benzino. Ĉu vi ne aŭdis la veterinaron diri, ke mi estas mirinda?"

"Li celis vian sanstaton. Hodiaŭ vi estas — finfine — en plena hararkresko. Nu, nur provu, ke vi havas ion, kion la aliaj ne havas!"

Kaĉjo regajigis, kaj liaj okuloj iĝis ĝemelaj gencianoj.

"Lasu ĝin al mi", li diris. "Intelekon mi havas. Mi elpensos ion, sed estas malfacile, kiam oni estas tre juna kato, nur ĵus post la katida stadio. Mi lavos al ili la kapojn. Krome, mi deziras premio-kokardon por maĉi."

Mi lasis lin. Revenante post tri horoj, mi vidis kelkajn unuopremiajn kuponojn sur lia kaĝo; ruĝo estas mia favorata koloro, sed mi eĉ pli preferas arĝenton kiam ĝi surhavas la vortojn Ĉefpremia Diploma. La

streĉiteco estis netolerebla, do mi lasis lin kun liaj juĝistoj kaj renkontis amikinson por temangi. Ni bezonis longan tempon, sed Kaĉjo havas siajn metodojn sen helpotruo mia.

Kiam mi revenis, lia kaĝo estis malplena. Mi rapidis por informi la Konkursan Organizanton, sed paŭzis ĉe la ĉeftablo. Jen Kaĉjo, tronante sur satena kuseno, ĉirkaŭite per drapiraĵoj, entuziasmaj fotoj kaj bruema publiko, maĉante, ridete kaj trankvile, gigantan premiokokardon. Oficantino tiumomente fermis lian kaĝon.

"Li estis tiel dolĉa, ke li ne bezonis sian kordon", ŝi diris. "Mi volus, ke ili ĉiuj estu tiaj."

Mi povis nur trapuŝi mian vojon kaj meti sep ruĝajn kartojn, du blujajn kaj la Ĉefpreman Diplomon sur la supron de lia satena kastelo, poste resti alparolebla kaj sorbi la flatajn vortojn.

Nokte, ni diskutis la aferon.

"Kaĉjo, vi estas konsterna. Vi estas senspiriga. Kun viaj grandaj oreloj kaj longa nazo — kiel vi sukcesis?"

"Nur per psikologio. Jen kiel okazis. Mi demandis al mi, kion mi povas proponi, suplemente al ĉio, kion havas multaj katoj. Vi konstante insistas, ke mi ne estas vigla, aŭ tipokonforma, do mi demandis al mi, kion mi havas donindan. Tio, kion la mondo bezonas, estas amo, kaj tio estas vera ankaŭ por juĝistoj. Simile al flatado, sed pli milda. Kiam ili ekzamenis min, mi metis miajn piedetojn ĉirkaŭ iliajn kolajn kaj brakumis ilin. Mi lekadis kaj kisadis dum la tuta tago kaj ili ridis kun mi. Vi-scias-kiu eĉ ridadis. Se kato kredas, ke la juĝistino estas perfekta, eble ŝi kredos, ke ŝi trovis la perfektan katon. Mi amas ĉiujn. Mi deziras floron, mi petas, ĉar mi estas la unua hipia kato. Mi amas ankaŭ vin, vi fia forkombantino de harimplikaĵoj. Ho, kion ili skribis pri mi! — belega kapo, bona supra konturo, intensa okulokoloro, bonega sanstato, belega temperamento... Jen, mi atingis."

Mi ĉirkaŭbrakis lin.

"Ĉu ili diris, ke vi estas modesta?"

"Mastrineto, kiam mi manĝos? Mi vidis iom da bovhepataĵo en la fridujo, kaj ĝi glutigos tre bone post la gusto de juĝistoj."

Tradukis: **Marjorie Boulton**

Kopiraĵto: Miriam Lion.

Noto: La ĉefpremio, kiun akiris la hipia kato, estis "Plej Bona en la Konkurso", aldonoj al premioj en lia branĉo, Blankaj Longharaj.

15/12 Bokens Dag

Ankoraŭ havebla:

SVEDA POEMARO

74 el la plej famaj poemoj de la sveda literaturo (Tegnér, Karlfeldt, Gullberg, Ferlin, Taube kaj aliaj).

Tradukis:

MAGDA CARLSSON-BOHMAN

Prezo 7: 10 kun imposto

Eldona Societo Esperanto

Fack, 200 42 Malmö 7

SVEDA ANTOLOGIO

— alltid perfekt som gåva —

och intressant att äga —

Pris inkl. moms:

Del 1 vol I end. inb. 23: 75

Del 1 vol. II end. häft. 14: 75

Endast några exemplar återstår.

FÖRLAGSFÖRENINGEN
ESPERANTO

Fack, 200 42 Malmö 7

Postgiro 578-5

NÄR GAV DU DIG SJÄLV EN BOK SIST?

Välj i "Librolisto" i UEA:s årsbok del 2 och beställ sedan önskeboken lätt och praktiskt.

FÖRLAGSFÖRENINGEN

Fack, 200 42 Malmö 7

Postgiro 578-5

KANADAJ RADIOJ



Toronto: La komerca banko.

Vojaĝon tra Kanado mi faris de oriento okcidenten. Mi komencis en du laŭ nombro de loĝantaro plej grandaj urboj Montreal kaj Toronto kaj, tra Ottawa, Edmonton kaj Vancouver, finis ĉe Pacifika Oceano.

Montreal kaj Toronto havas ambaŭ po ĉirkaŭ 2 milionoj da loĝantoj. Ambaŭ tiuj du urbejoj similas ankaŭ laŭ stilo kaj karaktero, parte tre similaj al usonaj urboj.

Montreal situas en la franclingva provinco Quebec, kaj tiu dulingveco estas ne nur klare prononcita per la uzado de lingvo sed oni ankaŭ sentas kvazaŭ karakteran duoblecon. Tipe estas ke la franclingvaj kanadanoj kiuj nomas sin franc-kanadanoj por diferenciĝi de anglo-kanadanoj kiuj nomas sin simple kanadanoj, tute ne volas aparteni al Francujo. Fakte la urbejo Montreal estas dividita je du partoj; franclingva kaj angla-lingva... Ĉu estas hazardo ke ĉiuj anoj de la montreala esperanto-asocio estas franc-kanadanoj kaj ili ĉiuj perfekte kaj elegante... krokodilas en pura kaj belsona franca lingvo? S-ano Maurice De Kinder kiu gajdis min (ĉu vi permesas uzi tiun neologismon?) en Montreal transdonis pere de mi salutojn al s-anino Vera Valberg, pri kio ŝi mem poste en

Stokholmo afable rememorigis al mi fia senhonta forgesulo!

En Toronto estis mia afabla gvidisto s-ano Hackett, tie mi kontaktis ankaŭ kelkajn aliajn fervorajn verd-stelanojn. Toronto situas pitoreske apud lago Ontario. La loĝantaro estas tre internacia. Cetere tuta lando Kanado ekzistas nur 100 jarojn. Unu el miaj konatuloj diris: mi estas devene pli kanadano ol la lando mem, ĉar mi scias pri ses generacioj ĉi tie naskitaj. Li estas posteulo de eskimoj aŭ indianoj kiuj estis la praloĝantoj de tiu grandega kontinento antaŭ ol eŭropanoj venis tien kaj forŝte... pardonu: ekloĝis tie.

Restante en Toronto mi dum unu dimanĉo veturis aŭtobuse al Niagara. Akvofalego, kiu situas inter kanada urbeto kun sama nomo (Niagara Falls) kaj usona urbo Buffalo. La unua impresio pri tiu akvofalego, plej granda en la mondo, ne estis tiel forta. Mi atendis ĝin pli granda, pli impona. Sed estante en la ŝipo kun centoj da turistoj, kiu alproksimiĝas ĝis distanco de nur ĉirkaŭ 100 metroj al la akvofalo, oni sentas tiam la egan potencon de tiu unika fenomeno kaj la tuta ŝipo ŝajnis esti kvazaŭ eta nuksoŝelo en la ĉirkaŭŝaŭmanta oceano. Niagarafaloj konsistas de du apartaj duoncirkloj distancitaj proksimume 100—200 metrojn unu de alia, unu iom pli granda ol alia. Kanado kaj Usono faris ĉirkaŭ la akvofaloj grandan turistan atrakcion, plenan da ĝardenoj, hoteloj, restoracioj kaj centoj da butikoj kaj budoj vendantaj memoraĵojn en multaj pli-malpli malbelaj formoj. Vespere oni lumigas ambaŭ akvofalojn per fortégaj reflektoroj kaj ĉio faras fabele koloran impreson je ĝojo de miloj da turistoj venintaj ĉiutage el ĉiuj anguloj de la terglobo.

La plej forta esperanto-movado es-

tas en la ĉefurbo Ottawa, eble dank' al energia agado de la prezidanto de Kanada esp.-Federacio, s-ano O'higin kiu kune kun kelkaj afabluloj montris al mi la belecon de la vere interesa ĉefurbo. Dank' al la fakto ke li deĵoras en la kanada parlamento, mi povis viziti ĝin (Ni povis ankaŭ iun vesperon fari agrablan viziton ĉe familio Thornton, kies du filinetoj, ambaŭ denaskaj esp.-inetoj deziras korespondi kun svedaj samaguloj.

En Edmonton bonvenigis min vera norda vintro. Urbo situanta meze de kanada kontinento, en provinco Alberta, faris impreson de malgranda sveda urbeto etendita sur tre vasta areo por doni lokon al duonmiliono da loĝantoj. Sed simpatia kaj plena da ĉarmo. Komparemaj pensoj flugis al Klondyke. Post Edmonton sekvis Vancouver, impona perlo de la Pacifiko. Pensu ke antaŭ 80 jaroj en la loko kie nun ekzistas Vancouver etendiĝis nur tundroj kaj arbaroj. Pro la racia kaj inteligenta planado oni konstruis tie unu el la plej belaj urboj de amerika kontinento. Kaj divenu la nomon de mia esp.-akompanto: s-ro G. Karlsson, kanadano de sveda deveno, flue parolanta svede kaj same flue esperante. Ni promenis kune dum tuta dimanĉo kaj dank'al li kaj lia amo al Vancouver, ankaŭ mi enamiĝis je ĝi. Post reveno hejmen mi ricevis ankoraŭ de li multajn bildojn pri Vancouver kaj pri tuta la provinco Brita Kolumbio.

Resume Kanado, la nova lando kun popolo miksitade de ĉiuj eblaj nacioj kaj rasoj, kunvivantaj en plena harmonio kaj komuna amo al sia nova patrujo, tre plaĉis al mi pro sia pureco, sekureco, honesteco, afablaj manieroj de la loĝantoj kaj bona organizo socia. Mi kun plezuro revenus tien.

E. Rytenberg



Ottawa: La nacia biblioteko.

DAN-SVEDA ESP.-TAGO

La Dan-Sveda Esperanto-Tago okazis ĉijare en Malmö la 5-an de septembro. 50 danoj kaj 100 svedoj partoprenis. Je la 8-a horo la danoj veturis per la "grandaj ŝipoj" al Malmö, kie la svedoj atendis nin kaj akompanis nin al Malmöhus. Tie la urbo regalis nin (ankaŭ la svedojn) per matenkafo kaj bulkoj, post kiam la reprezentanto de la urbo, kiu ankaŭ estas la ĉefo de la muzeo en Malmöhus, s-ro Knut Karlsson bonvenigis nin, akcentante la intereson, kiun li havas por nia laboro por neŭtrala internacia lingvo.

Je la 12-a horo tri aŭtobusoj disponigitaj de la urbo veturigis nin tra la urbo, kaj post 10 km-a veturado ni atingis la novajn urbopartojn, kie dekoj kaj dekoj da grandaj loĝdomoj estis konstruitaj. Ni vizitis unu el la domoj, kiu havas 3 kaj 4 ĉambrajn loĝejojn. Vere bele aranĝitaj ili estas; ni aŭdis ke la prezoj estas inter 400 kaj 600 sv. kronoj po monato.

Je la reveturo nin atendis la lunĉo en Riddarsalen en Malmöhus. La 150 partoprenantoj ĝuis la bone rostitan stekon, kiun la viglaj servistoj abunde proponis. La lasta programero estis montrado de "mistifikaj bildoj", kiujn s-ro Allan Johansson fotis. Lia specialaĵo estas foti de tre mallonga distanco, tiel la bildo donas tute alian impreson ol de normala distanco. Floroj, insektoj, plumoj kaj multaj aliaj aĵoj estas liaj objektoj.

S-ro Olle Olsson, kiu lerte gvidis la praktikajn aranĝojn dum la tago, nun atentigis nin pri la grava afero elekti trian membron por la dana komitato. S-ro Ejnar Hansen estis elektita, kaj s-ro Gustav Kühlmann informis, ke ni klopodos aranĝi la dan-svedan tagon 1972 en Frederiksberg, la mezgranda komunumo, kiu troviĝas meze en la granda kopenhaga komunumo.

Mi estas certa, ke ĉiuj kiuj partoprenis ĉijare konservos tre agrablan memoron pri la bela aranĝo de la urba estraro de Malmö kaj kun respekto pensas pri la malmöanoj, kiuj sub la gvidado de s-ino Andrén ebligis por ni travivi ankoraŭfoje la amikan atmosferon, renkontante denove malnovajn amikojn kaj kreante kontakton kun novaj. Tio antaŭ ĉio estas la intenco de la Tago.

EH



— Kial vi ne havas komercajn rilatojn kun Nilson?

— Ne, li estis finanĉita al mia edzino antaŭ ol mi edzinigis ŝin kaj mi ne ŝatas rilati al homoj, kiuj estas pli saĝaj ol mi.

Stipendio por SUK

Someraj Universitataj Kursoj (SUK) estas nova iniciato, kiu celas kunvenigi intelektajn gejunulojn el ĉiuj landoj por studado, diskutado kaj internacia komprenado.

La kursoj okazos de la 30a de julio ĝis la 27a de aŭgusto 1972, en Liège, Belgio. Eblas partopreni dum ĉiuj kvar semajnoj aŭ dum nur unu semajno, ĉar ĉiu semajno pritraktos unu temon de la ĉefa studdirekto.

Estos du ĉefaj studdirektoj: lingvistiko kaj medicinaj sciencoj.

La unua semajno de lingvistiko pritraktos ĝeneralan lingvistikon. En la dua semajno estos du paralelaj studdirektoj, fonetiko kaj matematikaj metodoj en lingvistiko. Ankaŭ en la tria semajno estos du temoj, komputera lingvistiko kaj interlingvistiko. La kvara semajno estos diskutkurso pri lingvistikaj problemoj.

La medicinaj semajnoj pritraktos biologion, anatomion, oftalmologion kaj histologion.

Esperantostiftelsen disponigos stipendion je 500 kronoj al juna sved(in)o, malpli ol 30-jara, kiu deziras partopreni al la kursoj. Skribu al Esperantostiftelsen, ĉe S-ro Erik Carlén, Yxhult, 690 60 Hällabrottet, plej malfrue la 1-an de marto 1972.

Pliajn informojn pri SUK donas Someraj Universitataj Kursoj, boite postale 9, B-4000 Liège, Belgujo.

SEF

VI VANTAR PA ER!

På annan plats finns annons ang. UEA-avgifter för 1972. Ni som ännu ej betalat den s. k. direkta UEA-avgiften var vänliga gör det nu. Låt oss inte få mycket extraarbete just i julen och på nyåret.

Minst MA (helst MS) både kan och bör ALLA vara.

SEF

FROSTAVALLEN 1972

Ni antaŭe informis, ke SVEDA SOMERA SEMAJNO, la tre konata, alt-nivela prelegsemajno denove okazos en Frostavallen en la jaro 1972 (30.7—6.8).

La temaro nun estas fiksita:

LA PROBLEMO DE LINGVA KOMUNIKADO

— kun speciala atento al la situacio en Eŭropo.

Prelegos: Prof. D-ro Ivo Lapenna, Britujo
D-ro W. Bormann, Germanujo
D-ro J. C. Wells, Britujo
S-ro Jean Thierry, Francujo

Aldone al la ĉefa temaro okazos diskutoj pri internaj problemoj de la movado laŭ titolo kaj subtitolo:

PERSPEKTIVO DE ESPERANTO KAJ VOJOJ POR LA ESTONTA AGADO


— ĉu la nuna Laborprogramo de UEA estas adekvata?

Petu informojn pri la prelegsemajno ĉe S-ro Jan Ströme, Amiralsgatan 36, S-211 55 Malmö, Svedujo.

Ni povas informi, ke ni sukcesis akiri novan, specialan poŝtĝiran konton kun la nomo de la prelegsemajno en Esperanto: Nomo: N-ro 26 26 31-5, Sv. Esperanto Institutet, Sveda Somera Semajno, Malmö.

Sveda Esperanto-Instituto

Årets fredspristagare om Esperanto



Willy Brandt

"Språkens olikheter är det svåraste hindret för folkens inbördes vänskap och samarbete.

Det internationella språket Esperanto strävar sedan länge med framgång att bryta detta hinder. Esperantos framgångar har erkänts av UNESCO, och FN understryker att man måste fortsätta den av dr Zamenhof började verksamheten.

Mätte förbättrandet av de internationella förbindelserna bli en helig plikt för varje politiskt aktiv medborgare.

Vänskapliga förbindelser mellan folk av olika nationer underlättar för politikerna att fullgöra sin uppgift: arbeta för fred."

MAGDA BOHMAN-CARLSSON

mortis en septembro, 75-jara, en Birgitta-gården en Rimbo, kie ŝi pasigis siajn lastajn jarojn. Je la enteriga soleno en la Misia Preĝejo de Rimbo SEF estis reprezentata de Tiberio Morariu, ŝia malnova amiko kaj Esperantoinstruisto. Por KELI parolis Vilhelm Grahn, kaj por ĝia stokholma sekcio W. Dahlin.

**MAGDA BOHMAN-CARLSSON
"IN MEMORIAM"**

(Profanaj kaj piaj pensoj ĉirkaŭ ĉerko de kara forfluginto.)

Ju pli oni maljuniĝas, despli rapide oni trakuras okule en la taga gazeto la rubrikon pri mortintoj kaj novnaskitoj. Iom post iom oni laciĝas eĉ priatenti nomojn, la rigardo pli fiksiĝas egoisme ĉe la ciferoj pri aĝo proksima al la propra aĝo de la leganto, kiu per tiu mekanika procedo provas diveni sian propran, baldaŭan forirdaton...

Ni forfoliumas la funebran parton kaj konsole konstatas per okula statistiko, ke la anoncaro pri novnaskitoj superas tiun pri la forpasintoj, do la Vivo venkas: ĝi kontinuas pere de niaj posteuloj.

Dum la enterigo de Selma Lagerlöf estis eble Harry Martinsson (se mi bone memoras) kiu asertis, ke priplorante foririntojn fakte ni priploras nian propran — baldaŭan aŭ malan — foriron... Olof Lagercrantz esprimis similan opinion...

Jen frapegas nian okulon funebra kruco super nomo tre kara al ni: **Magda Bohman**. Nomo tre konata kiel bril-arta tradukistino kaj original-talenta verkistino. Nomo eternigita per **Evangelia Kantaro**, **Sveda Poemaro**, **Sveda Antologio**, **Esperanta Antologio**.

Dum du jardekoj (eble eĉ pli) ŝi suferis pro kor-difekto. Sed ŝi portis sian krucon kurage. Frue pensiita de instruista aktiveco, povis sin dediĉi al la Belo. La Esperanta literaturo donis riĉan enhavon al ŝia vivo. Profunda kredo kristana helpis ŝin elteni la suferigan vivon. "**Per aspera ad astra**". Laŭ libera traduko: Per suferoj al la steloj. La Sinjoro provas nur elektitajn animojn. Ŝi estis speciale elektita... Nun ŝi redonis sian animon al la Kreinto. Sian korpon (t. e. kadavron) ŝi donacis al la Anatomia Instituto en Uppsala (por kuracista esploro favore al aliaj kor-malsanuloj).

En la Misia preĝejo de Rimbo, kie ni kolektiĝis ĉirkaŭ ŝia florkovrita ĉerko, rakontis la pastro, ke nia kara Magda estis lastatempe tiom malfor-



ta kaj malpeza, ke li devis ŝin porti surbrake sur la ŝtuparo. Kaj dum la lasta vizito de la pastro ŝia rigardo direktiĝis foren, en alian, pli luman mondon... La belan, helan preĝejon ornamis sola, simpla kruco. Ni pensis kun Strindberg: "**Ave crux, spes unica!**" (Saluton, kruco, sola espero).

Ripozu pace! Ĝis revivo, ĝis revido!

Ŝia malforta suferinta koro enteriĝis por eterna ripozo. Sed ŝi mem postvivis en siaj verkoj, en nia biblioteko, en nia cerbo kaj en nia animo.

T. M.

**KELKAJ REMEMOROJ PRI
MAGDA BOHMAN**

Dum dudeko da jaroj mi estis pli malpli en kontakto kun Magda Bohman. Mirinde, tamen, estas ke ni neniam persone renkontis unu la alian, vizaĝo al vizaĝo, sed nure per lete-roj kaj telefono.

Laŭ la leĝo de neceso kaj bezono mi ekenmiksiĝis en tradukadon de poezio ĉ. 1950. Tro frue, ĉar mi estis lingve nesperta. Sed Magda troviĝis, kaj pere de la inspira stokholma Keli-motora Arthur Wallin mi ricevis ŝian fakan kaj utilan kritikon kun bonaj konsiloj kaj, se necese, firmaj verdiktoj ("mia kara, adasismoj estas mortpeko!").

Nia kontakto pleje koncernis tradukojn de svedaj himnoj kaj religiaj kantoj por nova, sveda himnaro, "**Evangelia Kantaro**", kiu aperis en

la jaro 1952. La menciita Wallin iniciatis ĝin kaj Magda estis lia ĉefa kunlaboranto. Ĉiuj unuopaj numeroj de la kantaro iris tra ŝiaj manoj, kaj per sia granda talento ŝi levis la tuton al ĝis tiam neatingita nivelo. Tamen ne estis facila laboro. Ŝi foje plendis pro nekompenemo flanke de jam konataj tradukantoj, kiuj ne volis allasi plibonigojn.

Jam tiam Magda estis ofte malsana pro sia malforta koro, sed tamen laboradis eĉ en la lito. "Mi ne scias kiom da tagoj Dio ankoraŭ donos al mi, mi devas eluzi ĉiun", ŝi foje skribis.

Post "**Evangelia Kantaro**" venis la **Aldonoj I kaj II**, kies kernojn faris ankaŭ Magda Bohman kun novaj belaj provoj de ŝia traduka genio kaj profunda poezia sento.

Poste ni ne havis tiel bonan kontakton en la daŭro de pluraj jaroj. Por la nova internacia KELI-himnaro, "**Adoru Kantante**", mi tamen denove ofte interparolis kun ŝi. Unue ŝi bedaŭris sian malfortecon kaj mallemon al intelekta laboro, sed iom post iom ŝi entuziasmiĝis kaj eĉ proponis novajn tradukojn al la komitato. Ofte ŝi telefonis al mi frue en sabatmatenoj kaj estis scivolema pri iu aŭ alia nova traduko ŝia: "Ake, ĉu vi kredas ke ĝi taŭgas, ĉu vi kredas ke la aliaj ŝatos ĝin, ĉu mi eble prilaboru iom pli la linion..."

La laboro pri "**Adoru Kantante**" daŭris pli longe ol atendite, kaj Magda estis maltrankvila. Dum mia lasta telefona interparolado kun ŝi, en junio, Magda sentis sin tre malforta kaj ŝia voĉo estis kvazaŭ diafana kiam ŝi diris: "nun mi havas nur unu deziron; ke mi ĝisvivu la aperon de '**Adoru Kantante**', ke mi vidu la libron!" Laŭpromese la unuan ekzempleron kiu eliris de la presejo ĉe Stuttgart oni sendis al Magda fine de julio. Ŝia arda deziro estis plenumita. Kaj min tre ĝojigos tio, ĉar kvankam ŝi, iel, estis mia instruistino, ni estis geamikoj.

Ako Ahlrén

*Tarman, humilajn dankojn pro la ne-
atendita omaĝo en P.E.T.! Ĝi tute pezo,
bele aranĝita! Lerte elektitaj poemoj. Tro
da rovoj en la bela artikolo, sed ĝisto ja
ulas tiel dolĉa! Kaj vi mem forge kon-
trolis, ke neniu preseraro malbeliĝu
aŭ keĝ ridindigxu la "majstrarojn".
Dankon
fidele via*

Lasta saluto, ricevita okaze de nia
jubilea artikolo en nro 2/1971.

Magda.

Jen kelkaj eroj el la verkaro de Magda Carlsson. La unua poemo estas originala kaj esprimas la vivdevizon de la aŭtorino. La aliaj estas tradukoj el la sveda literaturo.

It recte, nihil timet

(Iru rekte, timu nenion.)

*Senfine povus tion ni diskuti,
disputi kaj aserti kaj refuti:
ĉu regu libereco en la arto?
Necesas eble ia Granda Carto!*

*Aŭ ĉu sufiĉus la okulojn lavi,
por nin de la malpura prudo savi?
Donaco feliĉiga kaj natura,
ĉu ĝin ekzili al kamer' obskura?*

*Plej gravas en beletro la intenco
Ĝin sondu, ho artista konscienco!
Se verko celas nur la artan veron,
kaj la esprimoj montras ja moderon.*

*Ĉar kulturitaj de la bona gusto,
l'aŭtoro povas, ĝis iama justo,
trankvile stari sub kritik' sulfura,
kun rekta dorso kaj rigardo pura.*

LARS ENGLUND:

La okuloj

*Miajn okulojn mi time-zorge gardas
— viajn mi amas.
Fermas la palpebrojn mole ĉirkaŭ miajn
— viajn mi kisas.
Mi ne scias, kies perdo pli suferigus:
Mi bezonas kvar okulojn por vivi.*

HJALMAR GULLBERG:

Mi intencas entrepreni longan vojaĝon

*Mi intencas entrepreni longan vojaĝon,
Pasos kredeble iom da tempo ĝis
nia revido.
La decido ne estas farita senpripense,
mi de longe estas intima kun ĉi tiu
plano,
sed nur nun mi povas malkaŝi ĝin.*

*Mi aranĝis multajn detalojn
kunlige kun la vojaĝo,
mi preparis ĉion krom la direkto mem:
kien tio ĉi vere kondukos, mi esploros
iom post iom.
Mi ekiros por serĉi ion en mi mem,
kion mi neniam sukcesis kapti ĉi tie.*

*Ŝajnas al mi ke oni vokas min tie
longe for,
mi deziras veni tien.
Mi kredas min kapabla elteni
certajn penojn
por atingi la celon.
Mia koro sentas tian liberigon,
pezo falis de mia brusto,
kvazaŭ granda ĝojo atendus min ie.*

RECENZOJ

Zora Heide: NI KOMEDIETAS...

La 8 skeĉoj de ĉi-tiu 32-paĝa broŝuro estas prologe prezentitaj de la verkistino kiel modestaj kaj sen iu literatura pretendo. Si, plue, mem nomas ilin "groteskaj ĉiutagaj epizodetoj". Restas nur atesti ke ŝi pravas en ĉio krom la ĉiutageco, kaj ke la ambicinivelo de la verko estas hontinde malalta. La esperantista legantaro havas la rajton postuli ke hodiaŭ presita verko sin levas super la nivelo de la antaŭmilita "arbusto-teatro". La ludo inter viro kaj ino, kiu estas la ĉefa temo de la skeĉoj, estas prezentita tiel, ke ambaŭ seksoj estas same ofenditaj.

Se la verkistino estus elektinta pli interesajn realaĵojn el la vivo, ellaborinte ilin kun gusto kaj rafinita fantazio, la rezultato certe pli kontentigus la leganton. Ni ankoraŭ atendas iun verkon de la mano de Zora Heide, kiu respegulas la kapablon, kiun ŝi sendube posedas.

Ake Ahlén

Zora Heide: Ni komedietas. 32 paĝoj. Broŝ. Kr. 3: 85.

Bertram Potts: Nokto da timo kaj aliaj noveloj. 80 paĝoj. Kr. 10: 60. Ambaŭ eldonitaj de Dansk Esperanto-Forlag. Haveblaj ĉe Eldona Societo Esperanto, Malmö. La prezono inkludas imposton.

BO BERGMAN:

Adago

*Ond'moviĝas, vent' muzikas,
Ondo, vent'karesas sin.
Post l'arbaro, ornuance,
mar'sekala ondbalance
lulas sin.
Vi nur mankas; kor' indikas
tion per malema mov'.
Min en dormon enmuzikas
milde mola blov'.*

*Nuboj naĝas jen ventpele:
cignoj de la ĉiellag',
sed silentas ili glite:
cignoj kantas nur trafite
de la sag'.
Vundis vojo min kruele,
premas vivotragedi',
volus gliti mi ventpele
kun la cign'al vi.*

Nokto da timo kaj aliaj noveloj.
De Bertram Potts.

La limo inter bonvolaj amatoroj kaj veraj verkistoj estas normale facile videbla. Nur malofte amato atingas valoran artan nivelon. Ricevinte libron kun la nomo Bertram Potts sur la titolpaĝo mi tial anticipis oscedis pensante: jen tiu aminda vojaĝanta novzelandano, kiu antaŭ jaroj vizitis ankaŭ nian landon, nepre volas eternigi sian nomon per iu legaĵo.

Sed — honore al la eldonejo Dansk Esperanto Forlag — jen ni ricevis gajan libron kun noveloj kiuj estas alloge streĉaj kaj krome havas senduban artan kvaliton. La lingvaĵo estas vigla kaj efikas freŝe pro oftaj modernaj turnoj kaj vortkunmetoj.

Krome la titolovelo kondukas nin al nekutima medio, arkta vintro. Impona geografia izoliteco kun severa vetero kaj timinda strangulo, ĉasisto kaj ŝakludanto, dramige reliefigas la ŝajne nesolveblan sorton de la esploristo Frank Partridge. Kiel li tamen superruzis sian antagoniston, mi ne malkovros ĉi tie.

Tute alispecaj estas la aliaj noveloj, sed tre bonhumoraj. La lasta roligas en tre sprita maniero nian Marjorie Boulton kaj la unuan poemomaŝinon.

Bertram Potts havas evidentan kapablon skribi naturajn kaj viglajn dialogojn por siaj roluloj. Tial mi volas aparte substreki la uzeblecon de la libro por instrua celo. Al daŭriganto post elementa kurso ĝi donos konsiderindan kaj praktikan vortprovizon, samtempe kun ekzercadon de vivanta, parolata lingvo.

Ake Ahlén

RICEVITAJ:

MIEDZYGORZE, turistbroŝuro eldonita de Malsuprasilezia centro de la turismo-informado.

LUND, URBO MODERNA PLENA DE VIVANTA HISTORIO, turistbroŝuro eldonita de Lunds Turisttrafikförening, Box 1083, S-221 04 Lund.

KLARECO POR HODIAŬ KAJ MORGAŬ, Eldonejo Zeit im Bild, Julian-Grimau-Alee, DDR - 801 Dresden. Dua eldono 68 p.


LIBRO DE APOKRIFĴOJ, de Karel Capek, eldonita de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 105 p. (1970). Prezo 1 us. dol.

UNU JARCENTO DE NACIAJ LUKTOJ 1847—1945), Fremdlingva Eldonejo, Hanojo (1970). 223 p.

PREZIDENTO HO CHI MINH (Resuma biografio), Fremdlingva Eldonejo, Hanojo (1970). 152 p.

LA TRADICIA VJETNAMIO — Kelkaj historiaj etapoj, Fremdlingva Eldonejo, Hanojo (1970). 170 p.

LA KULTURO DE LA RUMANOJ



Moderna ceramiko transilvania (Etnografia Muzeo, Cluj).

LA POPOLA KULTURO DE LA RUMANOJ

estas kaj riĉa kaj malnova. Kiam oni serĉas tiujn kulturelementojn kiuj estas speciale tipaj por la popola kunvivo, ni devas rigardi la bienon, la loĝdomon, vestojn, kaj la plej malnovajn laborojn, kiaj estas la terkulturo, paŝtista vivo kaj farado de kruĉoj.

La vilaĝo

kiu alformiĝis al la geografiaj premisoj, montras per sia strukturo la historian evoluon kaj tiel ankaŭ la aĝon.

En Transilvanio (mia hejmlando) oni povas diferencigi 2 ĉefkategoriojn de vilaĝaj komunumoj. La unua reprezentas primitivan, naturan loĝmanieron, neinfluitan de aŭtoritatoj aŭ eksteraj ordonoj. Tien ĉi apartenas tipoj de izolaj bienoj, vilaĝo kun domoj "disjetitaj" en la tereno, kaj vilaĝo kiuj etendiĝas laŭ valo.

La dua ĉefkategorio montras laŭplanecon. Du tipoj apartenas tien ĉi: la t. n. strat-vilaĝo kaj la geometria kolonia vilaĝo.

La neregula vilaĝo naskiĝis en bieno kiu ricevis proksimajn najbarojn kaj iom post iom kreskis je komunumo.

Koncerne Transilvanion estas grave studi la vilaĝtipojn, ĉar jene oni povas ne nur konstati la internan kronologion de la komunumoj, sed ankaŭ la pli aŭ malpli grandan aĝon de la enloĝantaj popul-grupoj.

Tiel oni vidas, ke la rumana loĝantaro loĝas pleje en primitivaj, nature elkreskintaj vilaĝoj, dume la aliaj popolkategorioj, hungaroj kaj germanoj preskaŭ ekskluzive loĝas en koloniaj vilaĝoj, t. e. en tiuj, kiuj apartenas al la tipoj de la strat-vilaĝo kaj geometria vilaĝo.

La geometria vilaĝo kun siaj rektaj stratoj precipe en suda Transilvanio devenas de la 18-a kaj 19-a jarcentoj laŭ la ordono de la hungaraj

aŭtoritatoj. Tiu ĉi estas tipa por la hungara konstrumaniero.

En la landvoja aŭ strata vilaĝo la domoj kuŝas dense laŭ 45-gradaj kontraŭ la strato. Ofte troviĝas du paralelaj stratoj. Tiun ĉi tipon enkondukis la saksaj koloniistoj dum la 12-a kaj 13-a jarcentoj.

La primitiva, natura vilaĝo naskiĝis dum pli frua periodo. Unu el tiuj formiĝoj, kun kunpremita, malregula konstruado, estas datebla al la 6-a ĝis 9-a jarcentoj, kiam dak-rumanoj kaj slavo komune loĝis en ĉi regionoj.

La disaj bienoj formantaj vilaĝon aperas precipe sur malebena tereno. La stratoj, respektive vojoj formas grandtruan reton kaj la domoj nur malofte staras laŭ la strato mem. Tiu ĉi tipo estas speciale karakteriza por rumana konstruado.

Alia speciale rumana vilaĝo etendiĝas en valo laŭ rivero. La profundo de la valo mem formas la ĉefstraton.

La plej malnova loĝformo estas la izola bieno, kiu fakte ĉiam estas loĝata de rumanoj.

Do nur la rumanoj en Transilvanio loĝas en vilaĝoj pratipaj. Nur tie ĉi kaj tie ili estis devigitaj de la aŭtoritatoj konstrui regulajn vilaĝojn, en kiuj ili neniam fartis bone...

En la vere rumanaj vilaĝoj la konstruaĵoj ne estas regule metitaj unu al la alia. La loĝdomo ne estas ĉe la vojo, sed des pli ofte la brutejo.

Ĉe la rumanoj precipe du biantipaj interesas nin ĉe nia enketo. La unua estas duobla bieno kun brutejo kaj stalo, domo kaj bestejo aparte por si mem; la alia la kunkonstruita bieno, kie la flankoj formas kvadraton.

La unuan tipon oni retrovas en Ŝlando kaj Gotland, ankaŭ en Ruslando, same en ĝia parto: Ukrainio. Eminentaj esploristoj devenigas ilin de la gotoj.

Ankaŭ aliaj similaĵoj kun Nordo troviĝas en Rumanio, ekz. la geo-

metriaj teksaj-modeloj devenintaj el sama fonto.

La fermita kvadrathieno estas kutima ankaŭ en Suda Svedlando kaj aperas sporade en Eŭropo. Ĝi estis verŝajne disvastigita de la germanoj.

En la Transilvania Ercmontaro estas kutima domtipo tiu kun tre alta kaj kruta tegmento. Ĝi estas sendube multaĝa. Tute sama domo troviĝis dum la neolita epoko juĝante laŭ domurnoj de la ŝtonepoko. Ĝi tipo taŭgas por pluvoriĉaj regionoj kaj ĝuste en tiuj lokoj ĝi estis konservita.

Ankaŭ sonoriforma bakforno — generale uzata — devenas de la malproksima epoko neolita. La kutima forno, kiu mem aludas pri malnova, fiksa konstruado, havas latinan nomon (caloni — forno, cuptor — bakforno; caldare — kaldrono).

Jen ni havas pruvojn pri la alta aĝo de vilaĝaj kaj bienaj aranĝoj kaj pri tiu de certaj hejmaj inventariaĵoj.

La alformigo de la konstruaĵoj laŭ la klimato kaj riĉa uzado de ligno kaj lignaj konstruaĵoj, uzante specialan, artan manieron — ĉio ĉi atestas pri pramalnova ekloĝo en tiuj ĉi karpataj regionoj.

La kamparanoj ĉiam teksis mem siajn vestojn, tapiŝojn kaj ŝtofojn el lano, aŭ el lino kaj kanabo, kiuj kulturkreskaĵoj sukcese estas kulturitaj tiom alte en la montaro kiom alten la konstruado povas atingi. La vestoj kompreneble trapasis tute aliajn influojn, multe pli radikajn ol la fiksaĵoj loĝformoj, la domo kaj la hejma fajrujo. Ili ja ne estas en same intima kunligo kun la tero kaj ĉirkaŭaĵo. Sed dank' al la konservitaj kutimoj de la rumana kamparano, estis pluraj vestpecoj konservitaj, kies alta aĝo estas pruvebla.

Tiel ni povas vidi ĉe miniaturoj el "Cronicon Pictum" en Vieno rumanaĵojn de la 14-a



jarcento vestitaj kiel hodiaŭ per kegliformaj ŝafpeltaj ĉapoj, ŝafpeltaj longaj surtutoj el lano. Oni scias, ke la ŝafpeltaj estis uzata de trakoj kaj skitoj dum pratempo.

Trian vestopecon oni povas sekvi reen en malnovan tempon, t. e. **granda, ronde tranĉita franĝa kolumo** kun kapuĉo. Sur la kolono de imperiestro Trajano en Romo, kiu prezentas al ni dakojn, oni povas vidi, ke ili portis la samajn, franĝajn vestpecojn laŭ tute sama maniero.

Pliaj partoj, kiuj sur sama bazo montriĝis tre malnovaj, estas la **hirta, vila lansurtuto, la larĝa zono kaj la malvasta blanka pantalone**.

Mi menciis, ke la **geometria ornamado en la rumana teksarto**, tre diferenca al la flormotivo de la hungaroj, prezentas frapan similecon al **tiu de la skandinava**. Povas esti, ke ĝi estis disvastigita de la **gotoj**. Ĉiukaze ĉi modeloj estas tre aĝaj.

Ni parolis pri vilaĝoj kaj loĝejoj, nun ni transiros al la **terkulturo**. Ĝi estas pramalnova en Transilvanio, kion pruvas arkeologiaj trovaĵoj. Eĉ hodiaŭ uzas la rumanaĵ kamparanoj **plugilojn samtĵipajn kiel dum la ferepoko kaj dentajn rikoltilojn laŭ la modelo de la bronzepoko**. — La dakoj uzis plugiltipon de la ferepoko, kiu tute ne estis iu primitiva hoko, sed similis al la nuntempa formo. La **dakoj estis bonaj terkulturistoj kaj dum la tempo de la romanoj uzis la produktojn tiel por nutri siajn trupojn kiel por eksporto**.

Koncerne la **postromanon tempon de la terkulturo**, ni devas nin turni al la **lingvoscienco kaj etnografio**.

En la rumana lingvo la **terminaro kiu koncernas la loĝejon** (bieno, korto: curte, domo: casa, pordo: poarta k.t.p.) kaj terkulturon agricultura, terra estas **de latina deveno**. Sed parto de la vortoj koncernantaj la **brutaron estas slava**. Tio signifas, ke la **rumanoj ĉe la alveno de la slavo estis terkulturistoj, dume la slavo okupis sin unuflanke pri bredado de bestoj**.

La latinaj nomoj en la terkultura-

do montras, ke ĝi daurigiĝis ankaŭ dum la transira tempo de romana al rumana epoko.

Latindevenaj estas i. a. la vortoj por kampo: câmp, semita areo: semanatura, plugkampo: aratura ktp. kaj termenoj rilataj al muelado kaj preparo de la greno je pano.

Alia etnologia argumento pri la alta aĝo de la terkulturo ĉe la rumanoj de Transilvanio estas la **terasaj semkampoj** sur la mont-deklivoj. Ili troviĝas plurloke en tiu ĉi provinco, kutime en la alto de 600—900 m., en la Transilvania Ercmontaro eĉ je 1300 m. La apero de la terkulturo supre en la altmontaro, kie cetere paŝtista vivmaniero estus plej natura, kaj kie la cirkonstancoj por terkulturo tute ne estas favoraj, verŝajnis tion, ke la loĝantaro de pli malsupraj regionoj savis sin tien ĉi dum certaj tempoj.

Eble estus surloke tie ĉi diri kelkajn vortojn pri la rumanaĵ paŝtistoj kaj pri la signifo de la vorto **transhumigo**. Jene nomas la etnologoj duonnomadan fenomenon, kiu ankoraŭ ekzistas en suda kaj meza Eŭropo. Ĝi similas certgrade al sveda kutimo paŝtista. En Svedlando oni kondukas la bestaron dum la somero al monteja paŝtejo, sed dumvintre oni havas la bestaron en la bona stalo, kie ĝi ricevas furaĝon. Sed laŭ la transhumiga sistemo la bestaro, kiu kompreneble pasigas la someron en la altmontaro, dum la vintro estas kondukata al lokoj kun pli milda klimato, jene havante eblon paŝti sin tutjare. La paŝtistoj pelas siajn gregojn de la Karpatoj ĝis la Nigra Maro kaj eĉ pli suden, migrante tre malproksimen trans la limojn de Rumanio.

La kulturo de la paŝtistoj akomodigis al ties vivo, ekzemple la primitiva vesto, kiu speciale taŭgas kontraŭ pluvo kaj neĝo. Prenus tro

da tempo detala priskribo, ni menci nur tion, ke oni kuiras la ĉemizon en buterlakto, aldonante certajn herbojn, dank' al kio la akvo ne povas trapenetri la ĉemizon.

Scienculoj konsideras, ke la **transhumiga sistemo estas de itala deveno**, ĉiukaze ĝi estas **pramalnova**.

Sed ni revenu al la **teraskampoj**. Plurloke oni trovis tiajn superkreskreskitaj de arbaro. Dokumente estas pruvite, ke en tiuj lokoj troviĝis kulturitaj teraskampoj dum pli frua parto de la mezepoko. — Aliaj terasoj estas tiom malnovaj, ke oni konsideras, ke ili estis fonditaj de la antaŭroma praloĝantaro. Cion ĉi pravas trovitaj objektoj kies devena dato estas konstatita. Ĉi terasoj kaj formo de altaĵa nutro vivo estas sendube altaĝa kaj atestas ankaŭ pri kontinueco.

Precipe hungaroj asertis, ke la rumanoj estis nur paŝtistoj, kiuj ne kulturis teron. Sed neniu bazo ekzistas por la supozo, ke la rumanoj estis nur nure paŝtistoj, nek por tio, ke ili estis ekskluzive terkulturistoj. Dum paca epoko floris la agrikulturo, sed dum danĝeraj kaj maltrankvilaj tempoj estis pli intensa la bredado de ŝafoj, ĉar ĉie troviĝis altaj paŝtejoj, dume la terkulturaĵojn oni devis lokigi al relative malmultaj, defenditaj lokoj. La paŝtista vivo de la rumanoj estis misuzita de tendencmuloj por pruvi, ke la rumanoj ne estis fikse loĝanta, terkultura popolo, sed nomadoj, kiuj pli malfrue alvenis al sia nuna loĝloko.

Tiu ĉi teorio pruvas, ke ĝiaj eltrovintoj ne scias kio estas nomada vivo, nek konas la alklimatigan povon de la rumanoj.

La nomadoj ja ĝenerale estas ligitaj al certaj regionoj kaj loĝlokoj. En la sud-kaj mezeŭropa kulturrondoj ne ekzistas nomada vivo.

Ni vidis, ke la terkulturo superregis eĉ en lokoj malpli taŭgaj por



Popoldanco "Batuta".

bestbredado, kiel estis plurloke en la montaro.

Okazis, ke transhumigaj grupoj forŝirigis kaj elmigris en la mondon. Same okazis dum malfacilaj cirkonstancoj, kiam malfavora sorto devigis ilin al migro. Sed ili en siaj malproksimaj loĝlokoj reprenis sian malnovan transhumigan vivon.

Transilvanio estas la centro, de kie la rumanaĵaj paŝtistaj migroj disradiis en ĉiujn direktojn.

Monto kaj ebena formas la **polusojn en la rumana ekonomia vivo**. La ebena reprezentas la **pacan tempon**, la montaro, kien la homoj retiris sin por trovi ŝirmejon, reprezentas la **militajn** periodojn. Oni provis veni kiom eble plej alten. Dank' al favoraj naturaj cirkonstancoj, la paŝtista vivo evoluis laŭ nekutime alta grado.

Kiam mezepokaj dokumentoj komencas paroli pri la rumanoj, ili estas nomitaj paŝtistoj. Tiu popoltavolo estis en konstanta moviĝo — en la regionoj de l'Karpatoj supren ĝis Bohemio. Oni rimarkis plej unue la paŝtistojn, sed ne la terkulturistojn, kiuj retiriĝis en la montaron for de la invadoj. Vakso kaj mielo apartenas al la produktoj eksportitaj el Transilvanio. La premisoj estis speciale favoraj por tiuj ĉi. La **abelbredado** estis eĉ dum la hungara reĝimo multe pli disvastigita en tiu ĉi parto de la lando, ol en aliaj provincoj. Ĝi estas sendube heredaĵo de la dakoj kaj kondiĉigas tute fiksan loĝadon.

En la Transilvania **Ercmontaro**, kie la surmontaj plataĵoj estas kovritaj de arbaro kaj kie la cetera naturo estas malpli favora por ŝafbredado, la loĝantoj okupis sin pri **lignaj laboroj**.

La rumana terkulturo en Transilvanio enhavas tro da aĝaj elementoj por ke oni povu kredi, ke ĝi estis transprenita de aliaj nur antaŭ kelkaj jarcentoj. La **alkutimiĝo** de la terkulturistoj al la **geografiaj kondiĉoj** sendube okazis dum longa tempo.

En **kunligo kun la terkulturado** ekzistas **sennombraj ritoj, legendoj kaj kutimoj** ĉe la rumanaĵaj kamparanoj. Ili ne estus tiom multnombraj se la



Farmodomo en Valakio.

terkulturado ne estus pramalnova tie ĉi, krome ili atestas pri **deveno de epoko antaŭ la kristanismo**. Se la rumanoj estus paŝtista popolo, kiu nur pli malfrue, dum la kristana epoko komencis okupi sin pri agrikulturo, ili ne tre estus konservintaj restaĵojn de fekundecaj ritoj kaj malnovan superstiĉon en arĥaika formo.

Unu el tiuj kutimoj rilatas la **plugilon**, la plej gravan terkulturan ilon. **Novjare** junuloj kondukas plugilon rondon haltante antaŭ ĉiu domo kaj deklamante poemojn, kiuj rakontas pri fazoj de la terkulturo de la plugado ĝis la rikolto. Tiam ili nomas ankaŭ Trajanon, la nomon de la nova reganto super la lando. Antaŭ la plugado oni starigas la plugilon meze de la vilaĝo kaj la mastrino ĉirkaŭiras ĝin, laŭ la iro de la suno (de Oriento okcidenten), kun akvo, floroj, incenso, pano kaj salo.

La unuan junan kamparanon kiu komencas printempe la plugadon, oni elektas kiel **"plugil-reĝon"** kaj li ricevas certan punrajton super la pli junaj.

En aliaj partoj de Transilvanio oni festas la unuan pluganton dum **Pasko**. Oni kondukas lin per veturilo al la plugita kampo kaj poste al la rivero, kien oni jetas lin. En kelkaj lokoj li estas vestita per tritika spikaro kaj kaŝas sin, sed oni trovas lin kaj **tremas en la akvon**. Post la rikolto oni metas kronon el tritikaj spikoj sur la kapon de juna knabino, kiu poste, sekvata de honorfraŭlinoj, iras al la vilaĝo, kie la kamparanoj **verŝas akvon sur sin**.

Do oni konsideras en tiuj moroj la plugilon, kiel objekton de kulto, kaj la unuan pluganton kiel estajon kun magia forto. Ĉe ĉiuj hindoeŭropaj popoloj oni trovas tiajn restaĵojn de terkultura adoro kaj ritario. Tiu, kiu estas vestita per grenspikaro, estas la demono de la fekundeco. La akvo per kiu li aŭ ŝi estas superŝutata, simbolas la pluvon por la estonta rikoltaĵo.

La **ceramika** arto ankoraŭ ĉiam floras en Transilvanio. Ĝi havas tre malnovan tradicion. La **spirala dekoracio**, kiu estas tiom karakteriza por **neolitikaj kruĉoj**, estas unu el la ĉef-



Kamparano en Bukovino.

motivoj ankaŭ de la **nuntempa** kampara ceramiko en Transilvanio.

Reliefa **serpento**, pri kiu la arkeologoj konstatis, ke ĝi estis dekoracia motivo dum antaŭroma kaj roma epokoj, kaj kiu estis konstatita tipe daka motivo, estas ankoraŭ ciam uzata en transilvania provinca ceramiko.

La rumana provinca kulturo montas malnovajn elementojn kun tipaj trajtoj pri ĉiu epoko.

Jam pratempe oni rompis **oron kaj salon** en Transilvanio. Estas neverŝajne, ke tiu ĉi ĉesis post la foriro de la romanoj. Ĝi ja havis gravan ekonomian signifon. Oni verŝajne daŭrigis tion laŭ primitivaj metodoj, kiuj ankaŭ hodiaŭ estas aplikitaj paralele kun la moderna rompadado. Ke ĉiuj ĉi malnovaj metodoj vivas ankoraŭ, estas pruvo pri kontinueco.

Neniu el la aliaj genroj en Transilvanio havas kamparan kulturon kun tiom profundaj radikoj en la pasinto kiel la rumanoj, kaj kun tioma alkutimiĝo al la ĉirkaŭaĵo, pruvanta pramalnovan konon pri tiu.

Kompilita de Tiberiu Morariu laŭ svedaj fontoj: verko de **Prof. Gustav Bolinder** "Rumäniska problem" (Rumanaĵaj problemoj) Stockholm 1944 kaj artikolo de **Prof. Alf Lombard** en "Svensk Tidskrift" (Sveda Revuo) 1942

(Represo permesita kun indiko de la fonto. Bv. sendi 2 ekz. al nia redakcio.)

Ilustraĵoj el "Peasant art in Roumania" de Prof. George Oprescu kaj el "Transilvania in historia poporului român" de Constantin Gurescu.

INT. SEMAJNO EN GOTENBURGO

En la kadro de la jubilea jaro de Gotenburgo aranĝis Inter — la memstara Agadgrupo por Esperanto — Internacian Semajnon, kiun sekvis komuna vojaĝo al la 56-a UK en Londono. Jam la 24-an de julio komenciĝis enhavoriĉa semajno en la motorista hotelo de OK. Matene la 30-an la grupo — sed nun kreskinta de 33 ĝis 43 partoprenantoj — komencis interese kaj iom nekutiman vojaĝon al Londono.

Montriĝis ke la motorista hotelo estis tre oportuna, bonekipita kaj eĉ eleganta konferencejo por la semajno en Gotenburgo. Tre bonaj ĉambroj, manĝoj, prelegejoj kaj sidĉambroj kontentigis la grupon kaj la aranĝantojn samgrade. Ĉio grave kontribuis al la amikeca sed samtempe aktiva kunestado. Dank' al bona kunlaboro kun la urba turisma oficejo kaj Societo por Kursagado en Universitato de Gotenburgo estis eble prezenti varian programon de la unua ĝis la lasta tago.

Inter la "eksteraj" programeroj rimarkiĝis vizito al la famkonata amuzejo Liseberg kun tagmanĝo en unu el la tieaj restoracioj, aŭtobusa rondveturo tra la urbo kun diversaj vizitoj, boatveturo tra urbaj kanaloj sub dudeko da pontoj kun interesa rondiro en la vasta haveno kun ĝiaj ŝipkonstruejoj kaj diversspecaj kajoj. Vizito al la kultura centro Götaplatsen kun tre detala studo de la internoj de la Koncerta Domo, Arta Halo kaj Urba Biblioteko, ĉiuj konstruaĵoj tre proksimaj unu al la aliaj kaj — laŭ multaj grupanoj — idealaj por estonta UK en la vigla, internacia urbo Gotenburgo.

Por la "anima" kontentigo zorgis prelegantoj kaj la agemaj, diskutemaj partoprenantoj mem. Du prezentojn faris s-ino Iva Åberg; Matena horeto de poezio kaj vespera prelego pri Prago eterna... (kulturhistoria prelego). Invitita de Universitata Kursagado estis mag. Vilho Setälä, Helsinki, kiu faris du prelegojn kun postaj demandhoroj: Kalevala kulturo — aspektoj de la finna popolpoezio kaj Kompara lingvostudado — referaĵo pri aktuala universitata laboro komisie de Finna Scienca Akademio. Menciinda estas la fakto, ke la sveda ŝtato disponigis honorarion kaj kovris ceterajn kostojn por s-ro Setälä. Ankaŭ s-ro Lennart Åberg faris du prelegojn pri La aktuala situacio de la internaciaj lingvaj problemoj ĝenerale kaj Esperanto-movado kaj ĝia pozicio en la debato pri tiuj problemoj. Post ĉiuj prelegoj sekvis ĉiam demandoj flanke de la vigla aŭskultantaro.

NIA LITERATURA REDAKTORO

Tiberio Morariu, petis, ke mi transdonu al niaj legantoj kaj al la esperantistaro lian varman dankon pro salutoj kaj donacoj, kiujn li ricevis okaze de sia jubilea tago en septembro.

Mi havis la favoron viziti lin inter la floramasoj en lia hejmo kelkajn tagojn poste kaj povis konstati, ke speciale gojiĝis lin, ke multaj el la partoprenintoj en liaj unuaj kursoj en Svedujo ankoraŭ memoras lin.

La estraro de SEF transdonis unu ekz. de Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, donaco tre konvena por lerta lingvisto kiu funkcias kiel literaturo redaktoro, kaj la Rumana Legacio sendis florbukedon kaj kelkajn botelojn de lia hejmlanda vino. El la multaj spritaj telegramoj kaj salutkartoj ni citas nur unu: "Pli da jaroj deziras al Vi Trodajara Teodor Julin. (92-jara)."

Raportis:
A. B.

PRENUMERERA

FÖR 1972 PÅ

ESPERANTO-TIDNINGAR

Heroldo	25:—
Kontakto	15:—
Kvinpinto	4:50
Kvinpinto stödjande	8:50
Oomoto	13:—
Sennaciulo	26:—

Moms tillkommer ej på dessa priser. UEA:s tidskrift "Esperanto" erhålles genom medlemskap i UEA och SEF:s "La Espero" genom Svenska Esperanto-Förbundet.

Förlaget förmedlar avgifter även till andra Esperanto-tidskrifter men kan ej ta ansvar för att dessa levereras.

ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7

Postgiro 578-5

HÖG TID

för

OBS!

ALLA bör vara med i UEA.
Gör Er inbetalning NU!

UEA-AVGIFTER

Låt oss undvika påminnelser. Avgifterna för 1972:

MA — medlem med årsbok och tidn. "Esperanto"	kr 43:—
MJ — medlem med årsbok	kr 21:50
MA-K — Ungdomsmedlem (22—25 år) med årsbok, "Esperanto" och ungdomstidn. "Kontakto" (vid inbetalning meddela ålder samt att "Kontakto" önskas)	kr 43:—
MS — samma som MA, understödjande medlem	kr 64:25
J-MJ — ungdomsmedlem under 22 år med årsbok	kr 10:75
J-MA — d:o med årsbok, tidn. "Esperanto" och ungdomstidn. "Kontakto"	kr 32:25
DM — "Dumviva medlem", betalar 20 MA-avgifter och är sedan ständigt UEA-medlem	kr 860:—

Avgifterna insättes å postgirokonto 14 74 29-5 (Svenska Esperanto-Förbundet, Specialkonto, Malmö). Angiv å talongen vad inbetalningen avser.

Sverige bör fortfarande ha fler MS-medlemmar. Undersök möjligheten kunna ansluta Er till UEA som MS-medlem. Det finns fler som kan bli Dumviva Medlemmar.

Ingen bör vara utan information (årsbok och tidning) från världsorganisationen. Anslut Er som direkta medlemmar i UEA. Men sänd helst Er inbetalning nu. Då besparar Ni oss mycket arbete.

Svenska Esperanto-Förbundet

KOLOSA KOLONO

KOLOMANO KALOCSAY

OKDEKJARA EN OKTOBRO



La profesie Kalocsay estis ĉefkuracisto kaj universitata profesoro en la hungara ĉefurbo, Budapeŝto. En la esperanta literaturo li estas la kreinto de la poezia artlingvo.

La Kalocsay-stelo aperis sur nia literatura horizonto en la jaro 1921 (en la semajna gazeto "Esperanto Triumfonta") per sia brila poemo "Sonorilludo", majstre komponita el sonoraj vortoj, kiuj imitas la sonadon de la sonoriloj.

SONORILLUDO

Vespere, en kor-bora, dolora monotono,
Subite, jen, eksonas la sonorila sono
Kun frapo ĝemanta,
Kun muĝo tremanta.
La frapoj ekbruas, fenestron ekskuas,
Kaj milde ekfluas muĝado, la sorĉa.
Ho, son' sonorila, vi, tondrosimila,
Kaj tamen trankvila, ravanta kaj dolĉa!
Doloro en koro sveninte dronanta
Sufokas, mi vokas al bronzo sonanta:

Ho, ŝvingu la langon,
Vi, tondre batanta!
Lamento giganta
Traringu la landon!
Priplendu la honton
De mondhekatomboj,
Per plendo pri tomboj
Ekfendu la monton!
Estingu flamlangon
De l' monstro malinda,
Longunga kaj blinda,
Sorbinta la sangon!
Atingu la fundon
De l' koro profunde,
Ĝi sangis abunde,
Do vindu la vundon!
Ho, ringo de kantoj,
Do fondu la Rondon,
Do fandu la mondon
En rond' de amantoj!

Sorĉbata, dolĉflata sonoro min levas,
Pri l' flamo de l' amo flagranta mi revas:
Ke festaj fajrolangoj disflugas
tra la landoj,

Ekruĝas la vangoj en fratĉirkaŭprenoj.
Kaj frate, en rondo solena, tra l' mondo.
Ekmuĝas la ondo de l' Kant' pri
Kompreno...

Sed ve, jam lastĝeme,
Kaj lace, kaj treme,
Kun mortadanta muĝo forsonas
bronza sono,
Kaj kaptas min denove dolora
monotono...

Samjare (1921) aperis la unua — modesta, sed altvalora — poemkollekto de Kalocsay: "Mondo kaj koro".

La vera debuto de Kalocsay okazis tamen nur en 1922, dum la 14-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinko, kie li deklamis sian salutpoemon "Kongresa Runo" verkita laŭ la majestaj versoj de la finna nacia epopeo "Kalevala", riĉe redonante allogan aliteracion.

Ni represas fragmentojn el la **Kongresa Runo** de Kalocsay (Streĉita Kordo, Literatura Mondo, Budapeŝto, 1931):

Vokas voĉ, de Väinemöinen,
Vibras vok en vaga vento
Kaj ĝin muĝas malproksimaj
Montoj, maroj murmurantaj.

La potenco praa patro
De la kantoj kavasantaj,
La bravulo kun la brila
balaanta blanka barbo

— — —
Miri venis mi miraklon:
Patrolingvon de la Mondo:
Lingvon, kiu liutsones,
lule ludas sur la lipoj,
Flate, flustre, flirte flugas,
Dolĉon donas dorlotante,
Muĝas kiel mar' majesta,
Kun titana tono tondras:
Ideala, inda ilo,
Instrumento konkuranta
Kun la kordoj de la kantelo.

En 1923 aperis "Kantanta Kamparo" (cento da hungaraj popolkantoj).

En 1922 fondiĝis la literatura-artrevuo "Literatura Mondo" en Budapeŝto kaj Kalocsay fariĝis ĝia ĉefredaktoro. Dum du jardekoj la nomoj Kalocsay kaj Baghy majestis sur nia literatura firmamento kaj kun ili ankaŭ tiu de la **eldonejo Literatura Mondo**.

Samjare aperis "Johano la Brava" majstra traduko de la hungara popolfabelo de Petöfi. La postan jaron aperis la brilega traduko de la fama drama poemo de Madách "La tragedio de la homo".

Tamen la kronon de la klasika traduk-arto Kalocsay gajnis per genia solvo de sia infere malfacila tasko: la virtuozaj redono de la trilaĵtercinoj de l'Infero de Dante.

"Streĉita Kordo" (Literatura Mondo, 1931) estas kvintesenca de lia originala poeziarto kun blindige brilaj gemoj.

EZOPA FABLO

La ĉeval' kaj bovo ie
Ekdisputis energie
Pri l' merito
En milito.
Diris la ĉeval' ' incite:
"Eh, malsprite
Estus dubi nian gloron
Kaj valoron.
La ĉevaloj
Al bataloj
Kuri ĉiam estis pretaj
Je l' trumpetaj
Sonoj,
(Iom helpis ankaŭ spronoj)
Kaj la ŝarĝon de l' kanonoj
Tra abruptaj ŝtonoj
Kiuj trenis?
Nur ni! — la ĉevalo benis.
Bov' respondis dum remaĉo:
Ĉevalaĉo!
Vi ja vane fanfaronas,
Ĉar ni donas
Tamen la plej grandan servon!
Ja al si la cerbon
La marŝalo vane rompas,
Vane pompas
La kuraĝo,
Se l' furajo
Mankas.
Kaj al kiu dankas
La viandon la soldat' malsata?
Al la bovo malŝatata!
Via gloro sole ŝajnas,
Ĉiun venkon bovo gajnas."

Paŝtis sin melankolie
Ankaŭ la azeno tie.
Ĝi malplaĉe aŭdis,
Ke sin ili laŭdis.
Ĝi iais
Kaj balais
La aeron per oreloj,
Kaj ekkriis: "Bagateloj!
Jen la vero:
Sur la tero
Se azenoj ne amasus,
La milit' eĉ ne okazus!"

(El "Streĉita Kordo")

..Kalocsay estas la majstro de la formo, patro de la tradicia poezio en nia lingvo, kaj nia plej modela stilisto, al kiu nia literatura historio ŝuldas eternan dankemon. Ke li vivu, kresku, floru, por sia propra kaj nia komuna bono!

Fine ni citas el la recenzo de S. A. Jakobsson ("La Espero" n-ro 3, 1971) pri **Kantoj kaj Romancoj de Heinrich Heine**.

Ĉi koncerna verko estas bonvena. Ĝi plenigas oscedan interspacon en la indekso de nia traduka literaturo. Krome ĝi provizas al ni novan pruvon pri la freŝa vivo de nia lingvo. La ĉefparton tradukis Kalocsay, dum Waringhien signis kelkdekon el la poemoj. Ni vere ŝuldas dankon al la tradukintoj kaj la eldonisto pro tiu libro.

T. M.



(Desegnis: T. Enghardt)

NI FUNEBRAS

Kalkulestro **TOR KALLER**, Danderyd, mortis 76-jara. Pli frue li estis organizestro ĉe la Eldonejo "Saxon & Lindström" (kaj kolego al redaktoro Henning Halldor, Esperantista Eldonejestro).

En 1920 li aliĝis al la pacifista movado kaj dum la lastaj 25 jaroj li prezidis la Stokholman sekcion de Sveda Paca kaj Arbitracia Unuiĝo. Dank'al lia iniciato kaj apogo la premio por pioniroj de Internacia lingvo kun ŝanco fariĝi lerneja studobjekto, estis donita al serio de elstaraj Esperantistoj.

Rektoro **Robert FUR**, Jönköping, forpasis 84-jara. Li estis diplomita teologo, estro de la Jönköping Biblia Instituto. Rektoro de la Kristana Altlernejo en Jönköping, kie sekve de liaj personaj intereso kaj propono. Esperanto estis enkondukita kiel lingva studobjekto. Je lia invito la tiama sindiko de SEF, T. Morariu, dum pluraj jaroj sinsekvaj gvidis Esperantan kurson laŭ la Cseh-metodo.

Ivan Johansson, Hallsberg, forpasis, 86-jara. Jam en 1929 li estis unu el la fondintoj de la Esperanto-Societo de Hallsberg kaj ĝis sia morto li estis fidela membro de la societo.

Mortis **Hjalmar Jakobsson**, Kiruna. Li estis en pli junaj jaroj tre aktiva esperantisto kiu pere de ABF entuziasme laboris, kaj li restis fidela al Esperanto.



MARGIT HÅKANSSON-FRISELL KANTAS

AKOMPANATA DE

JÖRGEN SANDBLOM

HO, DOLĈAS...
TAGON NUR...
LI PRI DANĜER...
NENIAM MI...

Njut av Margit Håkansson-Frisells vackra sång på Esperanto på vår grammofonskiva. Pris kr. 12: — inkl. moms och exp.-kostn.

Språket över gränserna

av Auld/Carlén är den lämpliga läroboken i Esperanto såväl enskilt som i grupp. Pris kr. 12: — inkl. moms och exp.-kostnader.

FÖRLAGET GRÖNA STJARNAN

Fack 7, 686 00 Sunne

Tel. 0565-111 25

Postgiro 8 84 51-0

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

YTONGBOLAGEN

Hällabrottet

NOVA SEKRETARIO DE SEF

La estraro je sia aŭtuna kunveno interkonsentis pri la jenaj ŝanĝoj ek de la jarturniĝo:

La nuna sekretario **Sven Alexandersson** forlasis tiun postenon kaj fariĝas **kasisto**.

Nova sekretari(in)o fariĝas s-ino **Ulla Luin**, kiu ek de la jarkongreso 1971 apartenis al la estraro sen speciala funkcio.

La nova sekretario apartenas al la junaj membroj de la estraro. Ŝi esperantigis en 1959 kaj aktive laboris en la junulara esperantomovado, dum kelkaj jaroj estrarano de SEJU kaj dua redaktoro de Kvinpinto. Ŝi restas ankoraŭ kasisto de TEJO.

Ekster la esperantomovado ŝi aktivas en la pacmovado, i. a. en Ungdomens Fredsförbund kaj sekcio en Tyresö apartenanta al la malnova pacorganizajo Svenska Freds- och Skiljedomsföreningen.

Ekzamenoj: fil. kand. pri angla kaj germana lingvoj kaj entreprenekonomio. Laboras ĉe la eldonoj Utbildningsförlaget.

ESPERANTO EN LA SVEDA RADIO

La 30-an de oktobro (sabato) je la horo 17.30 okazis dissendo en la sveda lingvo pri Esperanto. Dum duona horo gejunuloj el Kungälv rakontis pri Esperanto kaj ankaŭ prezentis esperantaj kantoj. Mallonga konversacio en Esperanto ankaŭ okazis. La dissendo okazis en Programo 3 kaj apartenis al serio da programoj, kiujn faras gejunuloj ĝis 16-jaraj.

Esperantista Renkontiĝo dum la Foiro en Leipzig (GDR) okazos la 11.3.1972 en Klubo de la Inteligentularo "Gottfried-Wilhelm-Leibnitz" 701 Leipzig, Elsterstr. 35, je la 19.30-a horo. Vizitu la Esperantistojn en Leipzig!

KORESPONDA SERVO DE TEJO

... eldonas bultenojn kun adresoj de korespondemuloj. Bonvolu sendi anoncetojn menciante pri sekso, aĝo kaj interesiĝoj.

Ĉiu anoncanto ricevos la bultenon.

Adreso de la servo:

KORESPONDA SERVO DE TEJO

Torun, Mickiewiczza 6/10
(por Halina Magdycz)

Pollando

FRIMÄRKEN

I Sverige råder nu högkonjunktur på vackra frimärken — motivmärken. UEA har som bekant i Danmark en central, som samlar upp använda frimärken från olika länder och sedan avyttrar dem, varvid vinsten tillföres UEA. Sänd använda svenska frimärken i större eller mindre kvantiteter. Skada dem inte. Klipp långt från tandningen. Välj i första hand sällsynta motivmärken. De högsta valörerna är mycket eftertraktade. Sänd direkt till S-ro P. Zacho, Åmosevej 5 A, DK 2700 Brønshøj, Danmark.

SEF

GRUPPRESA PER FLYG TILL PORTLAND

Särskild gruppresa till världskongressen i Portland 1972 anordnas ej av de skandinaviska förbunden. Vi hänvisar i stället till av UEA anordnad resa, som startar den 26 juli 1972 med flyg från Amsterdam.

Intresserade torde begära alla upplysningar direkt hos f-ino Vermaas, som av UEA fått i uppdrag organisera färden. Adress: F-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, ROTTERDAM-2, Nederlando.

ADRESSÄNDRING

S-ino Ester Andrén, Malmö (administrantino för UEA-avgifter och Kongressavgifter) har fått ny adress: **Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö** Tel.nr är oförändrat 040/652 09.

ESPERANTO-NYCKELN

är fortfarande ett mycket effektivt medel vid information om Esperanto. Köp hem ett antal och använd dem. Pris för 10 st. (inkl. moms och porto) kr. 3:—. Beställes hos Esperantoförlaget, Malmö, postgiro 578-5.

DEZIRAS KORESPONDI

Pri literaturo, serĉas — eventuale interŝanĝas — malnovajn esperantolibrojn. S-ro Arne Bengtsson, Åbybergsgatan 32, 431 31 MÖLNDAL, Svedujo.

PRI LUMTUROJ

Deziratas ricevi ĉiajn dokumentojn pri lumturoj el ĉiuj maroj kaj landoj (fotojn, libr[et]ojn, gazetartikolojn, k. t. p.)

Serioze rekompencos diversmaniere.

Korespondas franc-, german-, angla-, hispan- kaj esperantlingve.

Ŝtat-oficistestro Jean DUBUC, 4 Impasse d'Anvers, 76 — ROUEN (Francujo).

Brevmärke - Portland

Hjälp till göra reklam för världskongressen i Portland genom att på all post sätta det vackra brevmärket i tre färger. Varje karta innehåller 10 märken.

1 karta kr. 1:40

3 kartor kr. 3:—

Beställes genom att sända likvid till postgiro 14 74 29-5 (Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö).

Medlemsavgifter 1972

Arsmötet 1971 beslöt höja avgifterna för vissa kategorier medlemmar. Följande avgifter gäller för 1972:

KM	kluba membro	15:—
RM	rekta membro	25:—
FM	familia membro	5:—
JM	juna membro	7:—
JF	juna familia	
	membro	3:—

SEF

STIPENDIO

DE ESPERANTOSTIFTELSEN

Tiuj kiuj intencas partopreni al la Someraj Universitataj Kursoj en Liège 1972 povas peti stipendion ĉe Esperantostiftelsen, adreso ĉe s-ro Erik Carlén, Yxhult, 690 60 Hällabrottet.

Oni disdonas unu stipendion, kaj la stipendiito devas esti malpli ol 30-jara.

Limdato por la peto: La 1. marto 1972.

Ĉu vi deziras gajni 10-tagan ekskurson tra Pollando?

Partoprenu la novan konkurson de la Pola Radio

"FORUMO-EŬROPO -71"

La respondo al ambaŭ subaj demandoj ebligas lotum-gajni unu el la ĉefaj premioj — 10-tagan senpagan ekskurson tra Pollando:

1. KIEL VI RILATAS AL LA PROPONO DE LA SOCIALISMAJ LANDOJ KUNVOKI KONFERENCON PRI LA AFERO DE LA EŬROPA SEKURECO KAJ KUNLABORO, KAJ KION VI ATENDAS DE TIU ĈI KONFERENCO?
2. KIUJ PERSONOJ EN VIA LANDO KAJ EN KIA MANIERO SPECIALE MERITIGIS POR LA AFERO DE LA PACO?

Inter la partoprenontoj de la konkurso, krom la ĉefpremioj, estos lotumitaj multaj objektaj premioj kaj memordonacoj.

La leterojn kun respondoj oni sendu al: *Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Varsovio — 1, P. O. Box — 46; Pollando*, en kovertoj signitaj per la devizo: "Forumo" — *gis la 31-a de decembro 1971* (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj la 31-an de januaro 1972 en la Esperanto-elsendoj de la Pola Radio, kiuj estas aŭdigataj ĉiutage je la 6.00 h. (ondolongoj — meza: 200 m., mallongaj: 41 m., 49 m.) kaj je la 16.30 h. (mallongaj ondolongoj: 31 m., 41 m.). Ambaŭ elsendo-horoj estas indikitaj laŭ la mezeŭropa tempo.

Invitante al la partopreno en la konkurso ni samtempe petas diskonigi ĝin vaste inter viaj konatoj, samklubanoj, leter-amikoj. Ni firme kredas, ke en la konkurso, kies temoj kongruas kun la pacaj idealoj de la E-movado, la esperantistoj partoprenos amase.

Bonŝancon en la lotado de la premioj!

(Anonco)

POLA RADIO

57-a UNIVERSALA KONGRESO de Esperanto



29 juli—5 augusti 1972
PORTLAND (Oregon) USA



blir platsen för esperantovärldskongressen 1972. Anmäl Eder redan nu till kongressen. Svensk förmedlare (Peranto) av kongressanmälningar är som vanligt endast Svenska Esperanto-Förbundet.

Anmälningblanketter erhålles efter rekvisition hos s-ino Ester Andrén, Regementsgatan 27 D, 217 53 Malmö (tel. 040/652 09).

Anmälan. Anmälningblanketter och sedermera även beställningar av logi och utfärder skall insändas till samma adress, s-ino Andrén, Malmö, och icke till Holland eller USA.

Likvid. Avgifterna insättes på postgirokonto 14 74 29-5. Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö.

KONGRESSAVGIFTER

(Obs! Svenska kronor)

	Till 31/12 1971	Till 31/3 1972	Till 20/6 1972	Efter 20/6 1972
1. Kongresano, ne membro individua de UEA	150:—	165:—	180:—	218:—
2. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun jarlibro (MJ)	128:—	143:—	158:—	195:—
3. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA)	105:—	120:—	135:—	173:—
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1	105:—	116:—	126:—	164:—
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 2 aŭ 3	90:—	100:—	111:—	148:—
6. Junul(in)o ĝis inkl. 20-jara	45:—	50:—	54:—	92:—
7. Universitata student(in)o ĝis inkl. 30-jara	75:—	83:—	90:—	128:—
8. Blindul(in)o	60:—	66:—	72:—	110:—

Var vänlig skriv namn etc. tydligt på anmälningblanketten men ej några avgifter (det gör SEF). Meddela i stället allting tydligt på postgirotalongen.

Rabatt får som synes direkta medlemmar i UEA. Det lönar sig alltså att bli direkt medlem. Ni vinner många fördelar. Gör allvar av att anmäla Er som direkt medlem av UEA.

Gåvor: Som vanligt mottager SEF och vdarebefordrar gåvor till Litteraturfonden (tävlingspremier), Blindfonden (de blindas kongress), Adopta Kaso (för dem som ej kan betala från eget land) och Adoptaj Gepatroj (för barnkongressen). Givares namn publiceras. Svenskarna bör observera dessa fonder, även om Ni själva ej skall resa till kongressen. Lämna gärna Ert bidrag.

SEF

La Espero

Svenska Esperanto-Tidningen

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Adreso: Krokvägen 85, 122 32 Enskede.

Cefredaktoro: Åke Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping. Tel. 0510/235 26 (laborejo 0510/221 30).

Literatura redaktoro: Tiberio Morariu.

Teknika redaktoro: Sune W. Ahlm.

Prezo de jarabono: 20 sv. kr. (postöeka konto 20 12-3).

Prezo de anoncoj: 1/1 paĝo 180:—, 1/2 = 90:—, 1/3 = 60:—, 1/6 = 30:—, 1/12 = 15:—.

Millimetra prezo 40 öre.

Korespondanonco: 25-vorta = 4:—, 50-vorta = 8:—.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

SVEDA ESPERANTO - FEDERACIO

Adreso: Jungfrugatan 30, 3 tr.
114 44 Stockholm



Girkonto: 20 12-3

Telefona: 08/62 58 76

Dejortempo: Merkrede 18—20a horo

Kotizoj por Rektaj membroj: 25 kr., junuloj 7 kr.
familia membro sen gazeto 5 kr.

ESTRARO

Prezidanto: Jan Ströme, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö.
Tel. 040/12 92 11.

Vicprezidanto: Ragnar Hjorth, Kronobergsgatan 25, 4 tr ö. g.,
112 33 Stockholm. Tel. 08/52 76 67.

Sekretario: Sven Alexandersson, Krokvägen 85,
122 32 Enskede. Tel. 08/49 80 24.

Kasistino: Maria Wästfelt, Cedergrensvägen 27,
126 36 Hägersten. Tel. 08/45 02 41.

Bertil Akerberg, Lillsvängen 39, 126 57 Hägersten.
Tel. 08/46 29 95.

Artur Malmkvist, Asögatan 182, 116 32 Stockholm.
Tel. 08/41 78 74.

Franke Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.
Tel. 08/712 82 91.

Ulla Luin (sama adreso)

Tomas Jansson, Sturegatan 12 B, 752 23 Uppsala.
Tel. 018/11 73 09.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack, 200 42, Malmö 7

Ejo: Möllevångsgatan 20 B



Dejortempo 1 sept.—15 majo:
merkrede 10.00—11.00 jaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578.



Administranto: Anna-Greta Ströme

Prezidanto: Sven Sjöblom, tel. hejma: 040/11 25 78